

novembro 1969

62-a jaro

n-ro 768 (11)

esperanto

oficiala organo de

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176, rotterdam-2, nederlando - red. v. sadler



Radioamatoroj: P. 171

Vi trovos

en ĉi tiu numero — krom ĉio menciita ĉi-sube en la enhavtabelo — ankaŭ la plej novan katalogon de eldonejo STAFETO, kreaĵo de unu sola homo: prof. Juan Régulo Pérez. La 75 volumoj jam aperintaj sub la ŝildo de STAFETO prezentas preskaŭ nekredeblan fortostreĉon fronte al grandaj teknikaj obstakloj. Ĉiu, kiu eĉ nur supraĵe interesiĝis pri la Esperanta literaturo, scias, kia fenomeno en ĝia historio estas resumita en tiu simpla librolisto. Tial ni volonte dediĉas kelkajn liniojn por rekomendi al niaj legantoj tiun belan bukedon el Kanarioj.

Alispeca fenomeno estas la gazeto "Heroldo de Esperanto", al kiu ni dediĉas pli ol kelkajn liniojn en la sekvantaj paĝoj. Ĉar estas tamen fakto, ke ion kritiki — eĉ per satiro — signifas samtempe atentigi pri ĝi kaj tiel doni al ĝi gravecon, kiun ĝi alie ne havus, ni eble emfazu, ke tio ja NE estas la intenco...

Enhavo

- 169 "Organo de la Esperanto-movado" (Sadler)
- 170 Katedroj aŭ lektoratoj "serioze pritraktendaj"
- 170 Kial necesis altigi la kotizojn (Woessink)
- 171 Internacie paroli per amatora radio (Chambers)
- 171 Turistoj kaj Bulgarujo
- 172 Recenzoj
- 173 Laste aperis... (novaj eldonaĵoj)
- 174 Doloroj de Esperanto (satiraĵo)
- 176 Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)
- 176 Nekrologoj Manez, Zgórzewski, Aleman Ruiz
- 176 En "Esperanto" antaŭ 50 jaroj
- 177 S.I.A. en '70 (Semajno de Internacia Amikeco)
- 177 Esperanto en radio
- 178 Ni iru al Vieno (55a Universala Kongreso)
- 178 Konkursinde! (Belartaj Konkursoj 1970)
- 179 TEJO-Paĝo
- 180 Oficiala informilo n-ro 428, 1 oktobro 1969
- 180 Kalendaro decembro-majo

La kovrilo

La radio-amatorismo en Esperanto ĝuas renesancon en la lastaj kelkaj jaroj. Amatoroj en Eŭropo, en Norda, Centra kaj Suda Ameriko, en Orienta Azio kaj Oceanio vigle konversacias per radio, samtempe informante aliajn amatorojn pri la Internacia Lingvo per la plej efika el ĉiuj rimedoj: normala viva interparolado en Esperanto. Luiz Bolivar Fosca, prezidanto de la Klubo de Radioamatoroj-Esperantistoj en São Paulo, Brazilo, ĉiutage parolas kun la mondo en Esperanto. Pro liaj konversacioj, jam multe da personoj ekinteresiĝis pri la lingvo: ekzemple en Peruo, Kostariko, Angolo kaj Mozambiko. Sur p. 171 s-ro Bonnie Chambers (Havaĵo) skribas pri siaj spertoj en la pacifika radio-amatora rondo.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Ned.

Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1883-1910).

Aperas monate (escepte de aŭg.)

Abonprezo por unu kalendara jaro (1969): 18,75 gld. (kun membreco kaj Jarlibro 25,— gld.); (1970): 22,50 gld. (kun membreco kaj Jarlibro: 30,— gld.). Unuopa ekzemplero: 2,— gld. Por aerpoŝto aldonu: Aŭstralio kaj Nov-Zelando 13,75 gld. jare; Arg. 11,—; Jap., Braz., Sud-Afr. 8,25; Kan., Usono, Meks. 5,50; Israelo 2,75.

Anonc-tarifo: 1 paĝo = 285 gld.; ½ p. = 150 gld.; ¼ p. = 85 gld.; ⅛ p. = 50 gld.; 1/16 p. = 35 gld. Kliŝokostoj ekstere. Ripet-rabato 20 %.

Banko: Bank Mees & Hope, Blaak 10, Rotterdam-1.

Girkonto: 37 89 64 (UEA).

Telefona: (010) 23 27 88.

Telegramoj:

ESPERANTO ROTTERDAM.

Presejo: Drukkerij Zwagers, Rotterdam-6.

Legantoj en ĉirkaŭ 80 landoj.

estraro de uea

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj, landaj kaj fakaj asocioj, delegita reto kaj diskonigo de la agado de UEA: Prof. d-ro Ivo Lapenna, 77 Grasmere Ave., Wembley, Middx, HA9 8TF, Brit. Vic-prezidanto kaj estrarano pri komercaj kaj industriaj rilatoj: S-ro E. L. M. Wensing, Postbus 412, Eindhoven, Nederlando.

Vic-prezidanto kaj estrarano pri turismo kaj aŭtomobilismo: S-ro E. Carlén, Yxhult, S 690 60 Hållabrottet, Svedujo.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado kaj lernejoj: S-ro G. Becker, D-6653 Blieskastel, Alter Hangarten 2, Germanujo. Estrarano pri TEJO kaj junularaj aferoj: S-ro U. J. Moritz, D-5161 Merken, Andreasstr. 57, Germanujo.

Estrarano pri kongresoj kaj konferencoj: S-ro J. Thierry, 5 rue Léon Cogniet, F-75-Paris (17e), Francujo.

Estrarano pri kulturaj aferoj kaj eldonaĵoj: S-ro J. Ułpiński, Str. KRN 1 m 41, Warszawa 1, Polujo. Estrarano pri financoj kaj administrado: S-ro E. J. Woessink, Vondellaan 47, Arnhem, Ned.

„Organo de la Esperanto-movado”

La granda plimulto de la legantoj de "Esperanto" ne legas la gazeton "Heroldo de Esperanto". Ili do ne havis okazon observi, kiel tiu gazeto jam dum pluraj jaroj atakadis Universalan Esperanto-Asociacion kaj ĝiajn gvidantojn. Sub la respektinda standardo de "libera kritiko", "Heroldo de Esperanto" intermiksadas kelke da pravaj atentigoj kun tuta serio da misgvidaj aludoj, maljustaj komparoj, intenca prisilentado, miskomprenigoj kaj pure detruaj kritikoj. Aliflanke, kiam prezentiĝas laŭregulaj okazoj por publika kritiko kaj publika klarigo aŭ kontraŭ-argumento, ekzemple dum la Ĝeneralaj Kunvenoj de UEA en la kadro de la Universalaj Kongresoj, tiam la redakcio de "Heroldo de Esperanto" levas eĉ ne unu vorton kontraŭ UEA, kvankam ĉiam ĉeestante.

La motivoj de tiu kurioza kampanjo ne estas tre klaraj. Povus temi pri la persona malbonvolo, pri klopodo per kia ajn rimedo gajni abonantojn je la kostoj de UEA, pri la ambicio anstataŭigi la statuto bazitan gvidadon de la Esperanto-movado fare de demokratie elektita Estraro per la arbitra influo de gazeto redaktata laŭ persona bontrovo. En ĉiu okazo, la interesoj de la Internacia Lingvo kaj de UEA kiel ĝia reprezenta organizaĵo ŝajnis ludi ĉe "Heroldo de Esperanto" neglekteman rolon. Nun "Esperanto" dediĉas sian ĉefartikolon al tiu gazeto. Ĉu ne malŝpare? Ĉu ne pli bone "fosi nian sulkon" kaj ignori tiajn provincajn klaĉojn? Eble. En la pasinteco ni englutis multon, mute. Ankaŭ estonte ni verŝajne ne revenos al tiu temo. Sed malgraŭ ĉio, restas la psikologia fakto, ke ĉiu propagando fine havas efikon, se ĝi nur sufiĉe ofte estas ripetata. Homoj kiel d-ro W. Bormann, prezidanto de GEA, d-ro I. Chiussi, tradukinto de Korano, kaj mag. I. Dratwer, pioniro de la pola kaj poste de la Israela movadoj, sendis fortajn protestojn al "Heroldo de Esperanto" reage al ĝiaj lastaj redakciaj akrobataĵoj. Sed ne ĉiu leganto konas la movadon kiel d-ro Bormann kaj mag. Dratwer, kaj ne ĉiu scipovas analizi la stilnuancojn kiel d-ro Chiussi. Aliaj povus kredi la misprezentojn kaj ensorbi nekonscie la propagandon. Kaj se nur 10 % de la legantaro estas tiel trompitaj, tamen foje necesas respondi. En tiu ĉi numero ni respondas per armilo, kiu espereble ne tedos tro multe tiujn niajn legantojn (la plimulto, kiel dirite), kiuj ne konas la stilon de la koncerna gazeto. (Vidu. p. 174-175). Sed por ili, aparte, ni prezentas ankaŭ etan specimenon de heroldismo. Ni elektis nur kelkajn frazojn el nur la lasta numero de "Heroldo de Esperanto" kaj ekspozicias ilin sur tiu ĉi paŝo por via amuzo kaj edifo.

Specimeno 1

"La remuldo de la malnova Estraro — ligita al "gvidaj eraroj, administraj mispaŝoj, membrofalo, deficitaj kaj movadaj malharmonioj — estas sen-dube pozitiva decido. Tio des pli, ke la tri novaj Estraranoj estas konataj kiel demokrataj, moder-

La tri novaj estraranoj estas: s-roj U. J. Moritz, J. Thierry kaj J. Uŝpienski. Kaj la tri malnovaj, kiujn ili anstataŭis: s-roj M. Jaumotte kaj J. Toczyski kaj d-ro P. Zlatnar. Kion fakte diras "Heroldo de Esperanto"? Unue ĝi deklaras, nur tute koncize kaj parenteze (!), ke la malnova Estraro, inkluzive de Jaumotte-Toczyski-Zlatnar, estis "ligita al gvidaj eraroj, administraj mispaŝoj, membrofalo, deficitaj kaj movadaj malharmonioj". Bela listol! Kompreneble, "Heroldo de Esperanto" ne detaligas tiujn kvin akuzojn nek cerbumas, ĉu ili estas justaj aŭ ne... sed finfine "Heroldo de Esperanto" estas, laŭ sia propra subtitolo, "internacia organo de la Esperanto-movado", do certe fidinda gazeto, ĉu ne?

Due, ĝi bonvenigas la ŝanĝojn "pozitiva decido. Tio des pli, ke la tri novaj Estraranoj estas konataj kiel demokrataj, moder-tendencaj". Nu, se la malnova Estraro tiel fiaskis, kaj se la ŝanĝo de nur tri estraranoj estas pozitiva decido, do kredeble ĉefe kulpis tiuj tri, kiuj foriris, ĉu ne? Kaj se "Heroldo de Esperanto" trovas necesa emfazi, ke Moritz-Thierry-Uŝpienski estas "demokrataj", tiam plej verŝajne tiu malnova trupo estis maldemokrata kaj malmoder-tendenca, ĉu ne? Kompreneble, oni ne povas koni persone ĉiujn estraranojn de UEA, sed kion skribas "Heroldo de Esperanto", tion skribas "La plej populara sendependa internacia Esperanto-organo" (laŭ ĝiaj propraj modestaj vortoj), do certe fidinda gazeto, ĉu ne?

Specimeno 2

"Pli ol ĉe homoj, la respondeco de la pasintaj "malsukcesoj troviĝas ĉe la strukturo de UEA. Eĉ "tute nova Estraro, eĉ tute nova Komitato ne "povus sanigi la situacion, se ili plue restus kate-

"nitaj al malkorektaj konceptoj kaj al kadukiĝintaj "principoj." Jen pli rekta parolo, almenaŭ. Sed denove "Heroldo de Esperanto" nur preterpase aludas al iaj "pasintaj malsukcesoj", al "malkorektaj konceptoj kaj al kadukiĝintaj principoj". Ĝi eĉ ne klopodas klarigi al siaj legantoj tiujn aferojn, do verŝajne temas pri monde konataj faktoj, ĉu ne? Kaj tiuj malsukcesoj kaj eraroj troviĝas jam en la strukturo mem de UEA! Nenio savebla; ni faru revolucion! Estas vero, ke la Estraro kaj Komitato de UEA konsistas el la plej elstaraj aktivuloj de la tuta Esperanto-movado, elektitaj de 33 landaj kaj fakaj asocioj kaj 1408 delegitoj. Estas vero, ke "Heroldo de Esperanto" parolas sole nur en sia propra nomo kaj respondecas nur al si mem. Estas vero, ke la strukturo de UEA evoluis jam dum pli ol 60 jaroj kaj funkcias tute glate, kaj ke sole nur la sagaca redakcio de "Heroldo de Esperanto" kapablas percepti en ĝi "malkorektajn konceptojn kaj kadukiĝintajn principojn". Estas vero, ke "Heroldo de Esperanto" ne trovas necesa proponi kiun ajn novan strukturon, koncepton aŭ principon, sed limigas sin al nure negativaj kritikoj. Sed "Heroldo de Esperanto" estas "de 48 jaroj je la servo de la Internacia Lingvo" — do certe fidinda gazeto, ĉu ne?

V. Sadler

Katedroj aŭ lektoratoj „Serioze pritraktendaj”

- dana ministro

”Troviĝas katedroj aŭ lektoratoj de Esperanto en trideko da universitatoj. La eblecoj preni similan paŝon en Danlando estas laŭ mia opinio serioze pritraktendaj.” Tiel tekstas parto de gazetara komuniko eldonita de la Ministro por Kulturo de Danlando post lia vizito al elstare sukcesa Esperanto-ekspozicio aranĝita de Kopenhaga Esperantista Klubo. La Ministro, s-ro K. Helveg Petersen, faris ĉe la ekspozicio la inaŭguran paroladon. Pri lia eldiro kaj pri la ekspozicio entute raportis ĉiuj danaj ĵurnaloj, kelkaj eĉ plurfoje.

La ekspozicio daŭris du semajnojn dum aŭgusto kaj prezentis gravan sukceson por la kopenhaga klubo. Ĝi troviĝis en granda salono en suba etaĝo de ŝparbanko, en la ĉefa butikstrato de la urbo. Jam de sur la strato eblis rigardi ĝin tra la granda fenestro. Klubanoj aranĝis la materialon kaj deĵoradis kiel informantoj dek horojn ĉiutage.

Vizitis la aranĝon ĉirkaŭ 400 personoj ĉiutage, inter ili multaj eksterlandanoj kaj multaj kopenhaganoj, kiuj scipovas Esperanton sed pri kiuj la loka movado antaŭe ne havis informojn. Tiu lasta fakto montras, ke en grandaj urboj povas troviĝi



Dana Ministro por Kulturo K. Helveg Petersen inaŭguras la ekspozicion en Kopenhago.

multaj izolitaj esperantistoj, kaj ke unu el la funkcioj de publika (kaj alloga) ekspozicio estas — krom varbi kursanojn kaj ĝenerale informi pri la lingvo — ankaŭ altiri tiajn personojn al la organizita movado.

Kial necesis altigi kotizojn

Konata fakto estas, ke ĝis proksimume la jaro 1960 Nederlando estis unu el la plej malmultekostaj landoj de okcidenta Eŭropo, eble eĉ la plej malmultekosta. Sed, poste la aferoj ege ŝanĝiĝis, kaj nun en Nederlando ĉiuj prezoj estas egalaj al tiuj en apudaj landoj, eĉ kelkfoje iom pli altaj.

La plej granda parto de prezoj preskaŭ ĉiam dependas de la salajroj. Kaj la salajroj en Nederlando ege altiĝis. Laŭ la ciferoj de la oficiala ”Centra Oficejo de Statistiko”, la veraj salajroj de viroj, kiuj havas 21 jarojn aŭ pli, altiĝis de 100 en oktobro 1962 ĝis 168 en oktobro 1968, do en ses jaroj plialtiĝo de 68 %.

Tamen ne nur en Nederlando, ankaŭ en aliaj landoj de la mondo la salajroj plialtiĝis. Pri tio la nomita oficejo donis ciferojn, kolektitajn de la Internacia Laboroficejo en Ĝenevo. Surbaze de cifero 100 por la jaro 1964, la ciferoj estas:

Belgujo	125	(2a kvaronjaro 1967)
Britujo	127	(aprilo 1968)
Danujo	152	(2a kvaronjaro 1968)
Francujo	139	(3a kvaronjaro 1968)
Federacia Respubliko Germanujo	128	(julio 1968)
Italujo	125	(1968)
Svislando	125	(1967)
Usono	124	(novembro 1968)
Japanujo	147	(1968)
Ĉeĥoslovakio	116	(2a kvaronjaro 1968)
Pollando	120	(3a kvaronjaro 1968)

Ĝenerale do ĉie gravaj altiĝoj de la salajroj post la jaro 1964. Inter ili la plej alta kresko en Danujo kaj Japanujo.

Mi ankaŭ ricevis ciferojn, kolektitajn ĉe Unuiĝintaj Nacioj, pri altiĝoj de prezoj. Ili havas saman tendencon. Surbaze de 1964 = 100, la prezindekso por 1968 estis en Nederlando 118, Belgujo 114, Britujo 117, Danujo 127, Francujo 113, Fed. Resp. Germanujo 110, Italujo 112, Svislando 115, Usono 111 kaj Japanujo 123. (Pri aliaj landoj la ciferoj mankas.) Klare estas, ke feliĉe la salajroj altiĝis pli, ol la prezoj. Tio signifas plialtiĝon de la vivnivelo. Jen la evoluo en Nederlando:

Jaro	Vivkostoj	Salajroj	Ŝtata pensio	Kotizo MA
1964	100	100	100	100
1966	110	122	140	100
1969	127 (majo)	160	170	125

La daŭra altiĝo de salajroj kaj kostoj estas granda malavantaĝo por asocioj kiel U.E.A. La elspezoj de U.E.A. grandparte estas: salajroj, preskostoj kaj poŝtelspezoj, kaj, ĉar la kostoj de presado kaj de servoj de la poŝto grandparte rekte rilatas kun salajroj, ankaŭ ili preskaŭ same plialtiĝas. Tial la plialtiĝo de ĉiuj kostoj de la C.O. alproksimiĝas al la plialtiĝo de salajroj.

Ŝajnas al mi bone publikigi la suprajn ciferojn, por ke la (individuaj) membroj de U.E.A. havu klaran bildon pri la kaŭzoj, kial la Komitato de UEA sentis sin devigita plialtigi la kotizojn ekde 1970 per 20 %. La Komitato fidus, ke tiu altiĝo estos akceptita de la tuta membraro kiel necesa paŝo por fortikiĝo de la Asocio.

E. J. Woessink,
estrarano pri financoj

Internacie paroli per amatora radio

**B.J.
Chambers
(Havajo)**

Ordinare la lingvo estas unue parola komunikilo. Nur poste ĝi fariĝas skriba. Sed pri Esperanto la afero estas preskaŭ inversa, precipe ĉe izolitaj personoj. Kvankam tiaj personoj povas facile spertiĝi en la skriba lingvo per tutmonda korespondado, ofte mankas praktikado parola, precipe internacia.

Virga fonto de parola praktikado internacia estas la amatora radio, el kiu fonto ni ĉerpis ankoraŭ nur kelkajn gutojn. Ni plene ĉerpu el ĝi!

Ne necesas esti mem amatoro

Jam en Israelo, Liberio kaj preskaŭ ĉiuj amerikaj landoj la leĝoj permesas al ordinara persono, kiu ne estas mem radio-amatoro, paroli internacie per amatora radiostacio. Se vi loĝas en tia lando, elserĉu radio-amatoron najbaran, kiu posedas radiostacion telefonan, kaj petu de li rendevuon en la etero kun amatora Esperanto-stacio en alia tia lando.

Se la leĝoj de via lando nur al la amatoro mem permesas paroli, petu specialan permeson de la ministerio por komunikado. La permeso povus difini, ke la parolado okazu nur en Esperanto. Optimisma propono? Jes, sed ne malebla. Eminentuloj registaraj de pluraj landoj — eĉ la ministro por komunikado de unu lando — jam agnoskis la valoron de Esperanto. En tiaj landoj, kompreneble, le peto ricevas bonvolan pritrakton.

En la etero super Pacifiko jam funkcias radio-rondo Esperanta. Dum 180 "kunvenoj" ĝi ebligis pli ol 60 horojn da konversaciado. Ofte partoprenas personoj, kiuj ne estas radio-amatoroj. Jen listo de la radiostacioj en tiu rondo:

XE1M: D-ro P. Magana Erosa, del. de UEA, Tepeyac 94, Colonia Industrial, México 14, D.F., Meksiko.

XE2CB: D-ro V. M. Gonzalez, del. de UEA, P.K. 288, Monterrey, N.L., Meksiko.



D-ro Pedro Magana-Erosa apartenas al la ĉefaj pioniroj de la Esperanto-movado en Meksiko. Radio-amatoroj povas babili kun li kaj liaj edzino kaj nepino (sur la foto) per la voksignoj XE-1-M kaj XE-1-VU. Provul!

**Sinjorino
Eugenia M.
Magana de Baca
(stacio XE-2-AO)
lernis
Esperanton
per tute
neordinara
rimedo: simple
per konversacioj
internaciaj per
amatora radio. Ĉu unika kazo?**



XE2AO: S-ino E. Magana de Baca, P.K. 470, Chihuahua, Chih., Meksiko.

K7YTH: S-ro D. Richardson, del. de UEA, RFD Box 81, Eastsound, Wash., Usono.

KH6GT: S-ro B. J. Chambers, del. de UEA, 1740 Nakula St., Wahiawa, Havajo.

VK3AYN: S-ro H. W. Gilbert, 1 Roseberry St., Hawthorn, Vic., Aŭstralio.

ZL2AFZ: S-ro G. C. Studd, 48 Nuffield Ave., Napier, Nov-Zelando.


En la radio-regularo de Usono troviĝas tre interesa frazo en la difino de la celo de la Amatora Radio-Servo: "Daŭrigi kaj plivastigi la unikan kapablon de la amatoro kreskigi la internacian bonvolon." Al tiu celo ankaŭ ni laboras.

Turistoj kaj Bulgarujo

La sistema agado de Komisiono por Turismo ĉe Bulgara Esperanto-Asocio komencas doni fruktojn. Dank' al ĝia agado la lando iom post iom fariĝos pli alloga por turistoj, kiuj parolas Esperanton.

Post delegacia vizito ĉe la Ministeria Konsilantaro, BEA atingis, ke la ŝtata turisma entrepreno "Balkanturist" ekde 1970 eldonados prospektojn kaj broŝurojn en la Internacia Lingvo. Ĝis nun aperis tiaj materialoj nur sporade el Bulgarujo. Krome ĝi dissendis cirkulerojn al gvidantoj de ĉiuj oficejoj kaj entreprenoj, kiuj priservas eksterlandanojn, kaj disdonis milojn da flugfolioj en doganejoj, poŝtejoj, bankoj ktp. La ĝisnunaj reagoj estas kuraĝigaj.

En Sofio, dum la somero, kelkaj aktivuloj dismetis multlingvajn faldfoliojn pri Esperanto sur la fenestrojn de la aŭtoj de eksterlandaj turistoj. Ekde 1969, sofianoj direktis ĉiujn eksterlandanojn, kiuj petis la Esperanto-organizaĵojn mendi hotelĉambron por ili, al unu sama hotelo ("Vitoŝa"), tiel ke almenaŭ en unu hotelo estu daŭre aŭdata la lingvo. Tio jam rezultigis, ke kelkaj dungitoj de la hotelo eklernis Esperanton.



LEGI LA LEGENDAN BOTEV

Recenzas Simo Milojevič (Belgrado)

Elektita verkaro, de Risto Botev. El la bulgara tr. I. Dobrev kaj I. Sarafov. Redaktis H. Gorov. Sofia Press, 1969. 83 p. 20 cm.

Konsilinde estas legi la enkondukon de Risto Radevski nur poste, — ĝi estas tiel patose verkita, kvankam informrica, ke ĝi preskaŭ malrekomendas la libron.

Risto Botev — "sankta nacia standardo de Bulgarujo", estas laŭ ĉi tiu libro (17 poemoj kaj 8 prozaĵoj) ankoraŭ plene aktuala aŭtoro, kvankam ĉio aperanta en la libro estis verkita preskaŭ antaŭ unu jarcento. Oni kun ĝuo legas la poemojn, kiuj ne nur surpronis popolkostumojn, sed rekte kaj torente fontas el la bulgara folkloro. "Haĝi Dimitro", kun sia stranga plektaĵo de realo kaj fabelo, kun lupoj, feinoj, vundo, aglo, falko, kun morto kaj suno, viciĝas inter la plej belajn baladojn de la mondliteraturo. Kion ajn prikantas Botev: patrinon, amatinon, drinkejon, amikon, fraton — la libero de lia patrujo ĉiam ĉefrolas, ĉar li ja estis granda revoluciulo kaj tial granda poeto, malgraŭ tio, ke nuraj 20 poemoj postrestis lin.

Ponarde pika

Kaj la prozaĵoj, kvankam nur pri gazetartikoloj temas, ili estas vera malkovro! Brila menso, erudiciulo, polemikisto unuaranga, satiristo ponarde pika, — kredus oni, ke ĉio ĉi estis verkita hieraŭ, kaj ne antaŭ la jaro 1876, kiam Botev heroe pereis.

La tradukintoj bone plenumis certe malfacilan taskon. La poeziaĵoj plej ofte ne konservas la rimojn, sed jes la ritmon — karakterizan por Botev. Fojfoje ĝenas la uzado de formoj kiel: eksveni, ekmorti, ekkapti, eksaluti, hajdoto anstataŭ hajduko (ankaŭ ĉe Waringhien). Almenaŭ min ne ĝenas ofta esperantigo de turkaj vortoj kiel: ĉorpaĝio, bazirgeno, ĉeribaŝio, vilaeto, kiuj estas pli plaĉaj ol perforta traduko kiel: subkaserola tripiedaĵo kaj vespera laboramuzajo. Bonvenas 10 paĝoj da klarigaj notoj, kiujn enestas malĝustaĵoj priparolindaj, sed ne ĉi tie. La preso iom neperfekta, sed ĝenerale belaspekta, valora libro.

Mendu ĉe UEA: 6,54 gld. + sendokostoj 10 %.

Kvinteto '69 - Aperis nova skolo

Recenzas William Auld (Skotlando):

Kvinto '69; Hajkaro, de Hajkista Klubo. Oosaka: la Klubo, 1969. 46 p. Mimeo. 18 cm.

Ne plu dubinde: aperis nova skolo, laŭ vera senco. La Hajkista Klubo tion pruvas per la aperigo de tria poemaro, kiu montras rimarkindan maturiĝon, eĉ kompare kun la jam alta kvalito de la pli frua "Suito '67". Uejama masao, al kiu ne mankas humuro, kiel ni scias per lia prozkolekto "Ne grimacu!", ĉi-foje okupiĝas pri oldiĝo kaj celoperdo: "Obskur' alrampas/ krepuska de aŭtuno./ sed rev' ne lampas." Murata keinosuke inspiriĝas de ĉiutaga ordinario apud urba aktuala: "Sub jeto zuma/ balaas nun neĝkoton/ mi malvarmuma." Tomita tomu traktas oblikve aktualecon: "Glavo tre rusta/ el tumulto, - for krias/ vulpo krepuska." Tanaka sadami interesiĝas pri naturo kaj lingvaj sonfektoj: "Krescent' krepuska/ ĉe l' krest' de kruco blanka./ - kviet' kristnaska." Miyamoto masao sin turnas, ankaŭ oblikve, al la naturo: "Ĉe l' pruo blue./ ĉe l' poŭp' disŝaŭme spuras/ pramŝip' bruskue." Saluton al ĉiuj, kaj iliaj venontaj triumfoj!

Mendu ĉe UEA: 1,60 gld. + sendokostoj 10%.

KOREKTO

Pro bedaŭrinda tajperaro elfalis unu nomo el la rezultoj de la Belartaj Konkursoj 1969, aperintaj en la septembra numero nur la paĝo 143. Sub "Originala prozo" bv. legi ankoraŭ: Laŭda mencio: 4. Zora Heide (Danlando): "Renkonto kun la morto".

Unu lingvo de Britujo: la kornvala

Recenzas Humphrey Tonkin (Philadelphia):

Konciza historio pri la kornvala lingvo kaj ĝia literaturo, de Geoffrey H. Sutton. Rotterdam: la aŭtoro, 1969. 16 p. Ilus. 19 cm.

Dum la Mezepoko la kornvala, lingvo parenca al la kimra, estis ĝenerale uzata en la ekstrema sudokcidenta angulo de Britujo. Kvankam la angla frue fariĝis la klerula lingvo, la kornvala postrestis inter la proletaro almenaŭ ĝis la 16-a jarcento, kiam la angla nacia konsciigo kaj la strategia graveco de Kornvalo kombine forpuŝis ĝin. Ĝi posedis malgrandan literaturon, precipe dramon, kaj ĝia geografia regiono ĝis hodiaŭ retenis apartan karakteron, legendoriĉan kaj iom sovaĝan. Oni diras, kaj kelkaj dubas, ke tie originis la legendoj pri Reĝo Arturo kaj pri Tristan kaj Iseult.

Eblas malkonsenti kun s-ro Sutton pri kelkaj faktoj kaj opinioj (kiel spektinto de la ĉi-jara revivigo de la drama ciklo kornvala, mi povas aserti, ke li subtakas ĝian imponecon), kaj oni povas bedaŭri foreston de kelkaj gravaj verkoj el lia bibliografio, sed tiuj detaletoj neniel deprenas de nia ŝuldo al la aŭtoro pro tiu ĉi iom trista historio de lingvo mortinta pro esence politikaj kaj ekonomiaj kialoj. Hodiaŭ, eĉ kleraj angloj ofte ne scias, ke iam ekzistis kornvala lingvo; s-ro Sutton aŭtoritate forigis tiun mankon ĉe parolantoj de Esperanto.

Mendu ĉe UEA: 2,— gld. + sendokostoj 10 %.

FUNDAMENTOJ DE ELEKTROKEMIO

Recenzas Jean Dettwiller (Francujo):

Fundamentoj de elektrokemio kaj elektrodeponado, de Samuel Glasstone, Tr. John McCarthy. Monroe-ville, Pa.: Interparl, 1968. 124 p. 20 cm.

Malofte aperas en nia scienca literaturo verkoj, kies amplekso kaj valoro meritas komparon kun naciaj eldonaĵoj. Tiu libro eldonita de Interparl en kunlaboro kaj distribuado de KEMIO Internacia, estas unu el tiaj. Ĝi prave vekas la admiron kaj dankesprimon de fakulo, kaj oni povas kvalite ĝin taksu tre bonvena por ĉiu kemiisto.

La enhavon oni povas dividi en tri partojn: La unuaj dekdu ĉapitroj koncernas la principojn kaj fundamentojn de elektrokemio (teorioj de joniĝo, konduktiveco de solvaĵoj, elektropotencialoj, signifo de pH, pH-indikatoj, bufraj solvaĵoj, ktp.). La dua parto (ok ĉapitroj) enhavas principojn kaj praktikojn utilajn pli speciale por la elektrode-

ponistoj. La tria parto (18-paĝa) estas utila teknika terminaro Esperanto-angla kaj angla-Esperanta.

Sed devo de recenzanto estas ankaŭ montri mankojn kaj neperfektaĵojn. Unue, tro da eraroj: Mi statistikis 22 presajn, 6 dubajn, 4 gramatikajn, kaj krom tio mi ne nombris tiun ripetigantan senĉese (estas bonkonata ke; estas evidenta ke; estas supozita ke; ktp). Cetere oni foje sentas la gepatran lingvon de la tradukinto. Mi trovis plurajn pezajn formojn (povas esti havataj...), kaj kelkaj nekoheraĵojn en la paĝoj de la teknikaj terminoj.

Malgraŭ kelkaj aliaj mankoj kaj kritikendaj detaloj, la teksto, redaktita kun pedagogia intenco, estas lerte tradukita. La libro, presita sur bonkvalita papero kaj vestita per serioza bindaĵo, prezentas klarajn ĉapitrojn; ĝi estas tre plaĉa kaj indas vekti simpaton de ĉiuj sciencistoj.

Mendu ĉe UEA: 11,52 gld. + sendokostoj 10 %.



Lernolibro adaptita al la araba kulturo

Recenzas Italo Chiussi (Frankfurt):

Esperanto-araba lernolibro, de Nassif Isaac. Kairo: la aŭtoro, 1969. 71 p. Ilus. 24 cm.

La ekvilibro kaj la "pejzaĝo" de la araba lingvo estas tute aliaj, ol tiuj de Esperanto. Kvankam la araboj dum sia historio atingis brilajn rezultojn en la kampo de la abstraktaj sciencoj, tamen la argumentoj kaj la strukturo de la lingvo mem neniam forlasis la karakterizajn trajtojn de konkretismo en la logiko kaj de praktika metodologio. Ideoj kaj konceptoj, kiuj por okcidentano estas jam fiksitaj kliŝoj, kutimas esti traktataj tre detale, dum la nura vorto aŭ konciza frazo estas uzata, kiam okcidentano per multaj detaloj precizigus la aferojn.

Al mi ŝajnas, ke d-ro Nassif Isaac, kompilante sian lernolibron, tre ĝuste priatentis tiun fundamentan diferencon inter la du lingvoj, araba kaj Esperanto, ĉar la libro enhavas tiom da praktikaj kaj naturfidelaj ekzemploj (ankaŭ multajn proverbojn, tre grave por araboj!), ke la lernado de Esperanto fariĝas tute natura kaj interesa ankaŭ por persono, kies imagkapablo estas tiel malproksima de la okcidentaj normoj.

La preseraroj estas bedaŭrinde relative multaj, tamen ili ne sukcesas detrui la valoron de tiu tre rekomendinda lernolibro por araboj.

Mendu ĉe UEA: Prezo anoncota.

Laste aperis . . .

Belliteratur-amantojn ĝojigos ĉi-monate la longe atendata reapero de "La Infana Raso" de William Auld, ĵus reeldonita de Stafeto. La sama eldonejo samtempe liveris novan originalan sonetaron: "Arĉoj" de Geraldo Mattos, kaj popularsciencan verkon, same originalan, de la nov-zelandano W. F. Rolt: "El la polvo de la tero; enkonduko en la grundosciencan". Kiu ne ĉeestis la UK-on en Helsinki, tiu eble ne vidis la novan diskon de Sirkka Lehtivaara: "Ĉi tie sola kantas mi". Stereo-fona. kun ses finnaj popolkantoj, ĝi daŭras 12 minutojn kaj kostas 9,24 gld.

La plej granda korea vortaro

Herman Behrmann en Germanujo daŭrigas sian internacian instrukampanjon, kies lernantoj jam atingis 3000. Sub la titolo "Esperanto-programita" aperis la dua kajero de la serio kun akompana disko. Grava progreso por la korea movado estas la ĝis nun plej ampleksa "Esperanto-korea vortaro", verkita de Li hajpin kaj eldonita en Seoulo. Amplekso: 677 p.! Menciinda estas ankaŭ nova "Legolibro: De sezono al sezono", kompilita de Miyamoto masao. Ĝi havas japanlingvajn klarigojn, sed estus bone uzebla internacie.

Novaj politikaj broŝuroj el Pekino inkluzivas la plaste binditan "Statuto de la Komunista Partio de Ĉinio. Temas pri la nova statuto de 14.4.1969. Alian politikan tendencon havas "Leĝoj de la homa socio. I", 79-paĝa broŝuro de eldonejo Lanterno. Prezo: 1,80 gld.

Ĉiujn mendojn adresu al: Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando. Ĉe novaj eldonaĵoj ne ĉiam eblas tuj indiki la prezon en guldenoj. Al ĉiuj prezoj aldoniĝas 10 % por sendokostoj.



Bildigi la tutmondecon de Esperanto per diverskostuma infangrupo ne estas ideo nova. Sed tia sceno estas pli efekta, se la rolantoj estas efektive diversrasaj, kiel sur kamiono, kiu partoprenis paradon tra Walla Walla (Washington, okc. Usono).

NEKROLOGOJ

FRANCISCO MANEZ SANCHEZ (1888-1969)

Forpasis Francisco Manez Sanchez, unu el la plej elstaraj hispanaj ploniroj, la 31an de aŭgusto 1969, 81-jara. Naskita en Cheste (Valencia), li lernis Esperanton en 1907 kaj sukcesis atingi, ke praktike la tuta loĝantaro de Cheste lernis la lingvon. Malnova membro de UEA, li estis fakdelegito dum 16 jaroj.

MIECZYSLAW ZGORZEWSKI (1900-1969)

La 12a de julio mortis en Vroclavo, Pollando, la 69-jara veterano M. Zgórzewski. Li persone konis la familion Zamenhof kaj estis aktiva i.a. en la Informa Fakto de UEA.

ANTONIO ALEMAN RUIZ

Laste atingis nin sciigo pri la forpaso en La Habana, Kubo, de la dumviva membro d-ro Alemán Ruiz, 78-jara, je la 3a de decembro 1968. Li estis la fondinto de la unua landa asocio en Kubo kaj de la revuo "Latin-amerika Esperantisto".

LOKE - FAKE

LOKE

Ĉeĥoslovakujo

● Jus aperis speciala numero en Esperanto de la bulteno "Slovakiaj novaĵoj", regule aperanta en la angla, rusa, franca kaj germana. La 27-paĝa ofsetita kajero enhavas i.a. artikolon pri la Esperanto-movado en Slovakujo. Depende de la interesiĝo, ĝi poste aperos regule. Senpage ricevebla ĉe: Nacia Fronto de SSR, Bratislava, Štúrova 5.

Germanujo

● La ĉefurbestro de Bad Kissingen malkovris memor-tabulon honore al Zamenhof la 14an de septembro. Zamenhof kun sia familio vizitis la urbon unuafoje en 1911 por kuracado. Festparolis okaze de la malkovro d-ro W. Bormann, prezidanto de GEA.

Irako

● Radio Bagdado la 20an de septembro elsendis dekminutan paroladon de UEA-delegito Husen Al-Amili pri la Internacia Lingvo, precipe pri ĝia granda valoro por diskonigo de la araba kulturo.

Japanujo

● En la japana lingvo aperis biografio pri Teruko Hasegaŭa, aŭtorino de la aŭtobiografia "En Ĉinio batalanta". Aŭtoris la novan biografion Kooiči Tone. Eld. Joobunŝa, Tokio. Jurnalaj favore recenzis ĝin, kaj rekomendis ĝin la Asocio de Japanaj Bibliotekoj. Teruko Hasegaŭa mortis pro tifo en Ĉinujo, 35-jara.

● En nova libro pri fame konata japana verkisto Miyazawa kenzi, kompilita de Kusano sinpei, aperas artikolo "Miyazawa kenzi kiel esperantisto-poeto". Miyazawa efektive studis Esperanton kaj ankaŭ verkis Esperante.

EN „ESPERANTO”

Antaŭ ol foliumi la bruniĝintajn paĝojn de la n-ro nov. 1919 de revuo Esperanto, oni povas jam flari, en kia epoko ĝi eldoniĝis, leginte la titolon de la unua artikolo "La organizo de la Societo de la Nacioj". Post la sufero de la unua monda milito, oni momenton esperis pri tiu "belega programo".

Kompare kun la nuna "alspaca epoko", interesaj estas la artikoloj "Telefonaj Interparoloj kun aerŝipo" kaj "La transigo de la elektra energio tra la atmosfero" ...

"La telefona stacio en Nürnberg alvokis senfadene la stacion en la aerŝipo 'Bodensee'. Tiu telefonado estis la unua senfadena, inter terstacio kaj fluganta aerveturilo de tiom granda distanco."

"Oni eble opinios, ke la energio-perdo estos grandega, ĉar la radiadoj disirus al ĉiuj direktoj kaj nur malgranda parto estus kaptata de la rice-

- PERSONE

FAKE

Unesko

● La konata revuo de Unesko "Unesko-Kuriero", lanĉita en 1948 en la lingvoj angla, franca kaj hispana, nun aperas en 13 diversaj eldonoj en 12 lingvoj. La plej nova estas la eldono en la persa lingvo, ĵus komencita en Teheran.

PERSONE

Neergaard

● Prof. Paul Neergaard, la konata dana botanikisto, vizitis Tokion la 4an de aŭgusto. Akceptis lin dudeko da personoj, inter kiuj la prezidanto de JEI kaj la ĉef-delegito de UEA.

Sube: Memortabulo pri restado de Zamenhof en Bad Kissingen, ĵus inaŭgurita (Vidu: Germanujo)



ANTAŬ 50 JAROJ

vejoj." — La artikolo pri la transigo de la elektra energio tra la atmosfero klarigas la argumenton plej novan de usona sciencisto.

En la opini-kolumno de la legantoj estas argumento, ke kostumbalo en Esperantista kongreso ankaŭ estas bona, kontraŭ al la opinio en la antaŭa numero, ke tia balo estas sensencaĵo en la mizera epoko post la milito.

Fine: en la anoncoj troviĝas — "Edziĝo.- Esperantisto, serioza karaktero, deziras letere interkonatiĝi kun juna Esp-istino, celante edziĝon. Komencan skribaĵon oni adresu en fermita koverto sub "Feliĉo" al la Redakcio de "Esperanto", Museumsstr. 14, Bern, kiu ĝin peras. Malseriozaj leteroj estos resendataj."



**S.I.A.
en '70**

Amikeco trans limoj

Dum la 54-a Universala Kongreso okazis speciala kunveno pri la Semajno. Tie oni decidis, ke la Internacia Komitato de la Semajno ŝanĝu sian nomon al Komisiono por Semajno de Internacia Amikeco aŭ kurtigita Komisiono SIA. La landaj organoj por la Semajno tamen estontece prefere estu nomataj "komitatoj".

La kunveno esprimis la deziron, ke Komisiono SIA laboru kiel eble plej memstare kaj mem elektu siajn membrojn. Tio kompreneble okazu en kunlaboro kun UEA, kiu elektas komisiiton, kiu samtempe estas membro kaj prezidanto de la Komisiono.

S-ro Gustafsson (S), membro de la Sveda Komitato SIA, atentigis, ke la esperantistoj okaze de la Semajno sendu amikokartojn aŭ aliajn salutojn ne nur al esperantistoj sed al neesperantistoj por disvastigi ekster niaj rondoj la ideon kaj tiel samtempe ankaŭ la lingvon.

S-ino Sandgren (S) proponis, ke ni dum la Semajno invitu eksterlandanojn en nia regiono aŭ al nia hejmo aŭ al kluba kunveno. Multaj eksterlandaj laboristoj ekz. troviĝas en Svedujo, kaj ili ofte estas izolitaj kaj sentas sin izolecaj. Ili certe aprezus inviton por rompi sian izolecon. La kontakto donus al ni ankaŭ okazon disvastigi inter ili Esperanton.

De nederlanda kongresanino venis propono elekti aliajn honorajn membrojn en la Komisiono aŭ por la Semajno. Oni menciis eŭropajn ŝtatestrojn, kaj la prezidanto promesis esplori la eblojn por tio.

Komisiono SIA (adreso Erik Carlén, S-690 60 Hällabrottet, Svedujo) danke akceptas proponojn pri novaj amikokartoj kaj ĉiajn sugestojn, kiuj povas esti utilaj.

Ni petas ĉiujn komitatojn aŭ komisiitojn en la diversaj landoj jam nun antaŭprepari la Semajnon. Faru jam nun agadprogramon.

Por Komisiono SIA
Erik Carlén

Esperanto en radio

Informojn pri radio sendu al s-ro G. Largantier, 29 Bd. Murat, F-75-Paris (16e), Francujo. Por aliaj detaloj vidu la julian eldonon.

RADIO ROMA. 2-XI, Tra la literaturo; 9-XI, Novaĵoj el Italujo; 16-XI, Italaj kanzonoj en Esperanto; 23-XI, Leterkesto; 30-XI, Kristana mondo; 7-XII, La baziliko de S. Maria la Granda en Romo, kie estas celebrata la meso en Esperanto; 14-XII, Insuloj Maddalena kaj Caprera; 21-XII, La venecia komediverkisto Carlo Goldoni; 28-XII, Castelgandolfo, la somerumejo de la Papo. La dua parto de ĉiu dissendo estas dediĉata al "Kuriero de Esperanto".



Maldekstre:
la nova du-
ŝilinga aŭstra
poŝtmarko
speciale
eldonita
honore al
la 70-a dat-
reveno de
Franz Jonas



NI IRU AL VIENO

55-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Vieno, 1 - 8 aŭgusto 1970

Alta Protektanto: Franz Jonas, Prezidanto de Aŭstrujo

Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

OFICIALA KOMUNIKO

Prezoj en Vieno

Por unu persono en dulita ĉambro la prezoj varias de 70 aŭstr. ŝil. (10 gld) ĝis 190 aŭstr. ŝil. (27 gld). Prezoj por matenmanĝo varias de 15 (2,10) ĝis 30 ŝil. (4,20 gld); por tagmanĝo de 30 ĝis 60 ŝil.; por vespermanĝo de 35 ĝis 70 ŝil.

Infana Kongreseto

Ĉe la konstanta adreso de la kongreso estas riceveblaj aliĝiloj por la 11-a Internacia Infana Kongreseto, okazonta paralele kun la 55-a UK en Vieno. La kotizo estas 50 gld. Du aŭ pliaj infanoj el sama familio pagas po 40 gld. Sekvu detalojn en venontaj komunikoj.

Adoptaj Gepatroj

Ankaŭ okaze de la 55-a UK estas malfermita la ebleco por ĉiu esperantisto kaj Esperanto-societo kontribui al la Fondaĵo "Adoptaj Gepatroj". Per la kolektita mono la Loka Kongresa Komitato subvencios la partoprenon en la Infana Kongreseto al infanoj el nepagipovaj landoj aŭ de nebonstataj familioj. La fiksita kotizo por la Fondaĵo estas 40 gld.

Junulara Tago en la 55-a UK

La Estraro de TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo) decidis denove organizi Junularan Tagon dum la 55-a UK en Vieno. Provizore la programo konsistas el labora kunsido en formo de publika kunveno, komuna tagmanĝo, posttagmeza tribuno "Junularo provokas", podia diskuto kaj tradicia Junulara Vesperto kun dancado.

Finna karavanestro anoncita

La finnaj esperantistoj reciprokos la viziton de la aŭstroj en Helsinki 69 per aranĝo de propra karavano al la kongresurbo 1970. Interesiĝantoj kontaktu al s-ro Raimo Strandén, Louhentie 11 C 51, Tapiola, Finnlando.

Generala ekskursita plano

LKK preparas plurajn tre interesajn ekskursojn, tuttagajn, duontagajn kaj enurbajn. Kunlabore kun

Esperanto-fako de la naturamika organizaĵo oni projektas viziton al diversaj historiaj aŭ naturbelaj regionoj, ŝipekskursojn sur Danubo, postkongresan rondvojaĝon tra Aŭstrujo kaj ferian restadon en Salzburg, ktp. Kun la koncernaj vojaĝoficejoj la LKK traktas eblecojn ekskursi ankaŭ al proksimaj eksterlandaj urboj (Bratislava, Budepest, Ljubljana kaj Praha). Detaloj anoncotaj.

Nova kultura aktivaĵo

La antaŭnelonge establita Internacia Orkestro (s-ro Jo Haazen, Lijnwaadmarkt 11, Antwerpen 1, Belgujo) intencas prezentiĝi por la unua fojo al la kongresa publiko en Vieno. Ĝia repertuaro enhavas klasikajn muzikpecojn de malnovaj komponistoj.

Perŝipe al Vieno

Turista Sekcio "Esperanto" en Sofio, kunlabore kun la komisiono por turismo ĉe Bulgara Esperanto-Asocio, traktas kun la ŝtata entrepreno "Balkanturist" la kondiĉojn por aranĝo de perŝipa ekskurso al Budapeŝt, Bratislava kaj Vieno okaze de la 55-a UK. Analogiajn paŝojn entreprenis ankaŭ Asocio de esperantistoj en Slovakujo, kiu klopodas atingi favoran kontrakton kun la vojaĝagentejo "Tatrantour" en Bratislava.

Provizora statistiko (8.10.1969)

Arg. 1, Aŭstralio 2, Aŭstrujo 16, Belg. 5, Braz. 1, Brit. 15, Bulg. 9, Ĉeĥosl. 5, Danlando 7, Finn. 13, Franc. 15, Gano 1, Germ. 21, Grek. 3, Hisp. 5, Hung. 6, Isr. 1, Ital. 8, Japan. 3, Jugosl. 6, Kanado 1, Nederlando 12, Norveg. 3, Nov. Zel. 1, Pollando 19, Portug. 1, Svedujo 15, Svisujo 1, UAR 2, Usono 5. Entute 203 aliĝintoj el 30 landoj.

Konkursinde!

UEA denove invitas ĉiujn siajn membrojn kaj membrojn de la 55-a Universala Kongreso partopreni la Belartajn Konkursojn. La kompleta, reviziita regularo de la Konkursoj aperis en la broŝuro "Statuto kaj Regularoj de UEA, kiun ĉiu individua membro de UEA ricevis senpage. Nepe ĉiuj konkursoj atente tralegu la regularon, precipe la artikolojn 1 kaj 2.

Kiel en la lastaj jaroj, la ĉijaraj branĉoj estas jenaj: 1. Originala poezio; 2. Tradukita poezio; 3. Originala prozo; 4. Originala drameto (por scenejo aŭ por radio).

Ĉiujn konkursaĵojn kun la aldonaĵoj laŭ la regularo oni sendu al la Sekretariino de la Belartaj Konkursoj: **s-ino E. Lapenna, Nova Ves 32, ZAGREB, Jugoslavio**. La limdato por ricevo de la konkursaĵoj estas **la 31-a de marto 1970**.

La valoroj de la premioj estas difinitaj jene: por 1-a premio, 100 gld.; por 2-a premio, 70 gld.; por 3-a premio, 40 gld.; por la premio "Nova Talento", 70 gld. Krome, la nomo de la "Nova Talento" estos engravurita sur la pokalo Henry Harabagiu.

Oni aparte petas, ke konkursantoj, kiuj tradukas verkojn de nemulte konataj aŭtoroj aldonu al la konkursa traduko koncizajn biografiajn-kritikajn notojn pri la aŭtoro. Tiujn notojn oni poste utiligos okaze de eventuala publikigo de la traduko.

TEJO - PAĜO



**Oficiala organo de TUTMONDA
ESPERANTISTA JUNULARA
ORGANIZO.**

**Respondencas: Wim Jansen,
Röntgenstraat 32 A, Vlaardingen,
Nederlando.**

LINGVA SEMINARIO EN MILANO

aŭ kiel kulturigi la junajn esperantistojn.

De la 31-a de majo ĝis la 2-a de junio okazis en Milano ĉe la ŝtata mezgrada lernejo "Daniele Marignoni" (kie Esperanto estas instruata jam de pluraj jaroj) Lingva Seminario por la Junularo. Tiu ĉi kunveno, okazinta nun la duan fojon, celas plialtigi la kulturen nivelon de la junaj esperantistoj per diskutado pri lingvaj problemoj en malgrandaj studrondoj, kie ĉiu povas libere esprimi sian opinion sub gvidado de eksperto. Partoprenis 22 gejunuloj, el kiuj 7 formis studrondon por komencantoj kaj 15 dividiĝis en tri rondojn por progresintoj. Temoj de la diskutado estis tradukado de literaturaj tekstoj el la itala lingvo en Esperanton kaj inverse, kaj interpretado de turismaj klarigoj. La bona sukceso kaj la viglaj debatoj ŝuldiĝas ankaŭ al la fakto, ke ĉiu partoprenanto ricevis anticipe la tradukotajn tekstojn kaj zorge preparis sin. Komunaj manĝoj kaj tranoktadoj donis al la kunveno plezurigan etoson ekster la laborkunsidoj.

La organizo, prizorgita de la junulara sekcio de Milana Esperanto-Klubo kaj precipe de ges-roj Ermigi kaj Mariuccia Rodari estis ĉiel laŭdinda.

Nicola Minnaja



LA NOVA PINTO DE TEJO

En Tyresö, Svedujo, estis elektita nova estraro de TEJO; jen la novaj gvidantoj kun siaj respektivaj taskoj:

prezidanto: Humphrey Tonkin (Britujo-Usono), oficialaj kaj statutaj aferoj, kunordigado, kongresoj, Patronaj Membroj, ĝenerala varbado;

unua vicprezidanto: Hans Michael Maitzen (Aŭstrujo-Germanujo), publikaj funkcioj, disvolvo de la Organizo, lernejoj;

vicprezidanto: Andrzej Grzebowski (Pollando), turismo, renkontiĝoj, Junularaj Delegitoj;

vicprezidanto: Hans Bakker (Nederlando), eksteraj rilatoj;

ĝenerala sekretario: Senad Ĉolić (Jugoslavio), administrado, landaj sekcioj, InformFolio kaj Novaĵoj-Nouvelles-News, komitato, fakaj organizoj, informado, eldonaĵoj;

vicsekretario: Renato Corsetti (Italujo), regiona agado;

kasisto: s-ino Ulla Luin (Svedujo), kasaj kaj transpagaj aferoj;

estrarano de UEA pri Junularo: Uwe Joachim Moritz (Germanujo);

estrarano: f-ino Ingrid Carlsson (Svedujo), kulturo, servoj, Programo Pasporto;

estrarano: Marian Dobrzynski (Pollando), labor-racigo, edukado de gvidantoj, studentaj aferoj.

La korespondadreso de TEJO estas ĉe la ĝenerala sekretario, Senad Ĉolić, Halilbašića 23, Sarajevo, Jugoslavio.

ESPERANTO POR SKOLTOJ KAJ SKOLTINOJ

La 2-an de septembro okazis en la Gubernia Junulara Domo de Osaka la unua leciono de Esperanto-kurso por skoltinoj, kiu estas aranĝata ĉiun mardon en septembro kaj oktobro de Gubernia Sekcio Osaka de Japana Skoltina Ligo. Al ĉi tiu kurso aliĝis naŭ gvidantinoj de lokaj skoltinoj; ilin instruas la UEA-Delegito Ŝindo per la nova lernolibro "Jamborea Lingvo" de Skolta Esperantista Ligo.

Kiel oni eble scias, la skoltinoj havos en 1970 Internacian Jamboreon kaj kampadon en la gubernio Osaka. Ĝia ĉefa celo estas internacia interkompreniĝo. Evidente, precipe en Japanujo la lingvaj baroj formas tre seriozan problemon. La skolta veterano K. Iŝii kaj inĝ. Ŝ. Sumija, nacia reprezentanto de SEL, faris multon dum la preparoj, kontaktante kun la guberniaj instancoj de skoltoj kaj skoltinoj. En 1971 la skoltoj havos Internacian Jamboreon kaj kampadon ĉe Monto Fuji, kiun partoprenos skoltoj el la tuta mondo. Estas kun certeco antaŭvidebla, ke ankaŭ skoltoj en Osaka imitos la por-skoltinan kurson tre baldaŭ.

**Sep komencantoj + 15 progresintoj
= la bazo de solida kaj klera junulara
grupo en Milano. "Postiĝintaj" sur
la foto, sed "progresintaj" en
ĉiu alia senco: la malnovaj
aktivuloj de TEJO d-roj Nicola kaj
Carlo Minnaja.**

OFICIALA INFORMILO

N-ro 428, 1 oktobro 1969

NOVAJ DELEGITOJ

Konforme al art. 11 de la Ĝenerala Regularo de UEA ni publikigas ĉi-sube la nomojn de nove nomitaj Delegitoj de UEA. Se ĝis la 15-a de januaro neniu membro protestas pro grava kaŭzo, la nomado fariĝis valida.

Brazilo: Waldomiro de Abreu, Pindamonhangaba; Esequias Raimundo Alves, Rio Largo. **Britujo:** Hilda Tharme, Bangor; Raif Markarian, Brentwood; Brian Barker, Maldon. **Danlando:** Gunhild Halager Mundelstrup. **Francujo:** Ben Sion Ohana, Gargenville. **Germanujo:** Hermann Zwikirch, Hannover; Heinrich Wieners, Lahr. **Japanujo:** L. Shelton Allen, Ginowan. **Kanado:** Jacques Gaucher, Pierrefonds. **Rumanujo:** Maria Vitályos, Tîrgu Secuiesc. **Usono:** Edward Lindberg, Buffalo.

NE PLU VALIDAS (en Jarlibro 1969)

Brazilo: Rio de Janeiro (FD Skoltismo). **Britujo:** Egremont. **Ĉeĥoslovakio:** La ĉefdelegito; Praha (D); Zilina-Závodi, (FD Elektrotekniko). **Germanujo:** Oberursel; Regensburg. **Hispanujo:** Las Palmas (FD Turismo). **Kanado:** Québec (D). **Nederlando:** Amsterdam (FD Bankaj aferoj); Deventer (FD Socikredito). **Pollando:** La ĉefdelegito; Nowa Sól; Ostrowite. **Svislando:** Locarno. **Usono:** Juneau; Saint Louis (FD).

Kalendaro decembro - majo

Decembro

- 6-7 Gen. Kunveno de IFEF, Parizo, Fran.
- 10 Tago de Homaj Rajtoj
- 15 Zamenhof-Tago (LLZ naskiĝis en 1859)
- .. Tago de la Esperanta Libro
- 26-4/1 Esperantistaj Skiferioj, Adelboden, Svis.
- 27-3/1 Int. Seminario de GEJ, Marburg, Germ.
- 31 Kotizoj Universala Kongreso altiĝas

Januaro

- 3-7 35a Novzelanda Kong., Napier
- 4-8 17a Aŭstralio Kong., Perth

Februaro

- 1a semajno: Fervojista Skisemajno, Malá Tatra, Slov.
- 22-28 Semajno de Internacia Amikeco

Marto

- 7-8 49a Kong. de FLE, Beekbergen, Ned.
- 27-31 Trilanda Kong. (Bel., Ger., Ned.) Aachen, Germ.
- 27-4/4 Int. Junulara Renkontiĝo, Aachen, Germ.
- 31 Limdato de la belartaj konkursoj
- 31 Kotizoj Universala Kongreso altiĝas

Aprilo

- 14 Zamenhof mortis en 1917

Majo

- 1 Limdato kandidatiĝo Int. Ekzameno
- 15-19 62a Franca Kong., 2a Renkontiĝo Franca Monaka Itala, Monte Carlo
- 16-18 Sveda Kongreso, Jönköping
- 22-25 54a Brita Kong., Harrogate

MEMBRO-SUBTENANTO 1969

271 Harry, s-ro R. L., Aŭstralio.

DONACOI (Gld.)

Fondaĵo Enciklopedio de Esperanto: Germanujo: Esperanto-Hochschulgruppe, Saarbrücken, 7,20. Japanujo: Huĝimoto, s-ro T., 20,94. Jugoslavio: Milojeviĉ, s-ro S., 8,20. Nederlando: de Boer, s-ro D., 10,—.

Ĝenerala kaso: Britujo: Wood, s-ro G., 14,—. Grekujo: Eliopoulos, s-ro K. G., 58,—. Kanado: Westgaard, s-ro D., 63,93. Nederlando: Moerbeek, s-ro R., 50,—. Nov-Zelando: Drengenburg, s-ro H., 4,22. Svedujo: Nilsson, s-ro N. G., 209,39. Usono: Esperanto-Societo de St. Louis, memore al George Falgier, 90,—.

Por "La Praktiko": Japanujo: Schmid, s-ro W., 15,—.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo.

Universala Esperanto-Asocio

INTERNACIAJ KONKURSOJ

Stato je la 30-a de septembro 1969

Konkurso I

Pozicio	lando	kvoto	poentoj	%
1	(1) Finnlando	2401	3240	134,94
2	(7) Usono	4022	4355	108,28
3	(2) Italujo	3737	3980	106,50
4	(3) Danlando	2648	2720	102,72
5	(13) Jugoslavio	3643	3640	99,92
6	(10) Svedujo	6192	6075	98,11
7	(12) Germanujo	6257	5970	95,41
8	(5) Britujo	5835	5530	94,77
9	(4) Japanujo	3837	3635	94,74
10	(6) Nederlando	5110	4665	91,29
11	(8) Svislando	1775	1555	87,61
12	(9) Francujo	6887	5710	82,91
13	(11) Hispanujo	2879	2270	78,84
14	(14) Brazilo	2950	1863	63,15
15	(13) Belgujo	1836	1145	62,36

Konkurso II

1	(1) Grekujo	288	456	158,33
2	(2) Aŭstralio	1275	1602	125,65
3	(3) Israelo	524	525	100,19
4	(5) Kanado	1103	1054	95,56
5	(4) Nov-Zelando	1171	1107	94,53
6	(6) Aŭstrujo	1231	1160	94,23
7	(7) Argentino	650	582	89,54
8	(8) Norvegujo	1343	1125	83,77
9	(9) Sudafriko	250	185	74,—
10	(10) Madagaskaro	250	120	48,—
11	(11) Islando	250	95	38,—

La Internaciajn Konkursojn partoprenas tiuj landoj, el kiuj oni povas libere altiĝi al UEA. Poentoj estas aljuĝataj laŭ la nombro de membroj, jene: AM = 1; MJ kaj J-MJ = 5; MA, MA-K kaj J-MA = 10; MS = 15; Patrono kaj DM = 50. La kvoto estas la meza poentaro atingita en la lastaj 5 jaroj. Interkrampaj ciferoj indikas la pasintmonatajn poziciojn. Laŭ la rezultoj je la 31-a de decembro la kotizperanto de la venkinta lando en ĉiu el la du konkursoj ricevas je sia dispono libropremion de 100 gld.



D-ro B. Szemenyei (vidu: Sudhungarlanda...)

Tarifo: po 0,25 gld. por ĉiu vorto. Pri la enhavo de la anoncetoj kaj anoncoj respondecas sole nur la anoncantoj.

Kutimiĝu al internacia parolmaniero per aŭdado de sonbendoj. La Magnetofona Servo de UEA, (2040 Springbank Road, Port Credit, Ont., Kanado), povas rekomendi al vi modelajn registraĵojn kaj sendi, kontraŭ 1 respondkupono, kompletan liston de siaj programoj.

En la studio de "Esperanto-programita"
(Vidu: Jam 2600 personoj...)



Sudhungarlanda Koresponda Servo serĉas precipe komencantajn gekorespondantojn por siateritoria Esperantistaro, por plifortigi la internacian amikecon. Skribu al la sekretario: D-ro Bálint Szemenyei, Huba-u. 38, Orosháza, Hungarujo.

Se vi serĉas seriozajn gekorespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejo) turnu vin al la Koresponda Servo de UEA, adreso: K.S.M., 12 rue des Jacobins, F-63-Clermont-FD, Francujo, kiu peras adresojn laŭ la regularo en la Jarlibro.

Fraŭloj, skribu al juna flegistino por serioza amikeco. Vilhelminal, C. Bulvaras 2-30, Kaunas 9, Lietuva, Sovetunio.

La membroj de nia Esperanto-Societo serĉas gekorespondamikojn el la tuta mondo. Respondu al s-ro Vilho Seppälä, adreso: Muurola, Finnlando.

S-ro Himjar Al-Rašid, P.O. Box 15001, Bagdad, Irako, komencanto, deziras korespondi kun gesamideanoj el eŭropaj landoj. Aĝo 36, ekonomisto.

ANONC- ETOJ

Himjar Al-Rašid (Bagdad)



Jam 2600 personoj en la testkampanjoj! (Vd. p. 149). Pli ol 300 dankletoj alvenis. La testmaterialo estas taŭga donaco al neesperantistoj, kiuj scias la germanan. Prezo: Esperanto-programita-1 kun disko kaj Informbroŝuro 11 rpk. aŭ 5,55 GM. Hermann Behrmann, D-4972 Löhne 1.

Por kompletigi mian kolekton mi bezonas la tri lastajn numerojn (junio ĝis aŭgusto 1914) de *Časopis Českých Esperantistů*. R. Molera, Sta. Joaquina 13, Moyá (Barcelona), Hispanujo.

Kolektantoj! Petu Informojn de la Esperantista Kolektanta Centra Informejo kaj senpagajn specimenon kaj anonceton de la fondinto: R. Melo, 15 rue Richelandière, 42 St. Etienne, Francujo.

Klubo Paris 2000. Aliĝu al nia mondklubo de korespondado, kolektadoj, vojaĝoj, amikeco, ktp. Sendu aĝon, lingvojn parolatajn, vizaĝ-foton, ktp. Aliĝo senpaga. Abono al nia monata gazeto kun centoj da fotoj kostas 6 dolarojn aŭ saman valoron. Gekunlaborantoj estos bonvenaj. Skribu tre legeble al Klubo Paris 2000, B.P. 379-03, Paris R.P., Francujo.

S-ro J. K. Kuller, Mudgegonga 3737, Victoria, Aŭstralio, volas korespondi tutmonde pri ĉiuj temoj Esperante, angle, france aŭ hispane. Ne poŝtmarkoj.

UK 1971 - LONDONO!

Lastmomente ni povas anonci, ke la Universala Kongreso de Esperanto en 1971 okazos en la brita ĉefurbo Londono. Tiel decidis, post zorga konsidero de la kandidatoj, la Estraro de UEA.



Universala Esperanta Stenografio.
Lernolibro por instrui sin mem
aperis sub la aŭspicioj de UEA kaj
de EKI.
(prezo: gld. 17.75 = 71 steloj).
Mondo, Rothstr. 7, CH-8057 Zürich.

esperanto

Unike uzebla varbilo el plasto. Ĝiaj detaloj: 24 x 5 cm, verdaj minuskloj sur blanka fono. La aŭto estas surgluebla sur ĉiun ebenan surfacon. Sur aŭtomobiloj, fenestroj ktp. ĝi longe varbas por Esperanto. Prezo de 3 ekz.: 5,— GM. Mendu ĉe: Peter Weide, 2 Hamburg 61, Nordalbingerweg 65.

Fondita en 1966

La Lingua Internazionale (ESPERANTO)

(iama "L'Araldo Esperantista", naskjaro: 1926)

Fondinto-Redaktoro: Konrado Cerri

Itallingva poresperanta gazeto.
Formato cm. 32 x 44. 4-paĝa. 5-kolona.
Papero flavkolora. Verda inko. Presita.
Ilustrita. Trimonata. Absolute neŭtrala.

Eldonnumero: 2500 ekz.

Jam atingitaj pli ol 10 000 malsamaj adresatoj!

Ne estas fiksita abonkotizo. Ĝi estas sendata al tiuj personoj itallingvparolantaj, kiuj faras oferdonon (valoron de unu paketo da cigaredoj) kaj interesiĝas pri la internacilingva problemo. Dezirate regajni tiujn, kiuj studis esperanton kaj pro iaj kaŭzoj forlasis la oficialan movadon.

Klopodu regajni perditajn samideanojn!

Ekzistas multaj dekmiloj da itallingvparolantoj, kiuj ne ricevas plu novaĵojn pri la esperanto-vivo. Klopodu regajni ilin al la esperanto-movado per tre malalta elspezo (it. L. 250).

Adresu:

**Prof. Konrado CERRI, LI-E
Casella Postale 159
I-13051 BIELLA (VC)**

Pĉk: Prof. Corrado Cerri - n. 5 - 742 - 13051 Biella (VC).

Abonu al la fondita en 1964

BIBLIA REVUO

Dumonata internacia gazeto pri Bibliaj kaj Orientaj Studoj

(ordinara jarabono: 6 usonaj dolaroj)

Petu senpagan ekzempleron kaj diskonigu ĝin.

Varbu membrojn al la fondita en 1967

I. A. B. O.

"Internacia Asocio de Bibliistoj kaj Orientalistoj"

faka kunlaboranta asocio de U.E.A.

(aliĝo simpla 2 usonaj dolaroj; ordinara 6; subtenanta 50; dumviva 300).

Donu vian apogon al la fondita en 1968

EKUMENA BIBLIO- FONDAĴO

por ebligi la eldonon de komuna traduko en Esperanto de la Sanktaj Skriboj.

Sendu viajn abonprezojn, kotizojn kaj donacojn al Administracio de Biblia Revuo (Pĉk. 8/17852), Piazza Duomo 4 — 48100 Ravenna (Italujo).

Sep originalaj kantoj

sur unu disko:

„LA FELIĈO”



**La voĉo kaj melodioj de Ramona
van Dalsem**

Eldono de UEA

Prezo (ink. tekstojn de 3 el la kantoj): 2,50 gld.
+ sendokostoj 10 %.

Daŭro: 15 min. Rapideco: 33 t/m.